

Naturalismo ne estas vojo, laŭ Karolo Piĉ  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 537, 1981.12.03 & 05

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel ni diris la pasintan semajnon, la romano "La Litomiŝla Tombejo" havas eksperimentan karakteron. En ĝi Karolo Piĉ provas konkretigi kion li teorie esprimas en sia eseo pri "La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj."

A.- Por Karolo Piĉ "la romana lingvaĵo ne povos maturiĝi en esperanto "sen:

Cl.- precizaj terminoj por ĉiuj objektoj de la cirkaŭa mondo;

A.- aro da vastsencaj terminoj laŭeble polisignifaj;

Cl.- necesa sinonimigo kaj sinonimizo de la vortaro;

A.- riĉe disvolvita sistemo afiksa;

Cl.- abundo da kliŝoj kaj diversaj malgrandaj vortetoj (prepozicio konĵunkcioj, pseŭdoadverboj, interjekcioj);

A.- plua aglutinigo de la tuta vortaro, kiu kondukos al la konsekvenca aplikado de la dua parto de la 15-a regulo, kaj al retrodeduktado, kiu estas unu el la neeldiritaj principoj de la Plena Ilustrita Vortaro;

Cl.- ĝisfunda malnaturaligo kaj raciigo de la sistemo;

A.- kuraĝa ĉerpado el la propraj fontoj kaj provizoj;

Cl.- kelkaj urĝaj pliprecizigoj kaj korektoj;

A.- ĝenerala koncizigo, malpezigo kaj elastigo de la stilo.

Cl.- Karolo Piĉ konscias pri la revolucio, kiun lia eseo kaj romano eble alportas. Li komparas ĝin al tiu, kiun la Parnasa Gvidlibro enkondukis en la jaroj tridekaj. Ni citu lin:

A.- "Oni povas do atendi, ke sur la romana kampo okazos la sama lingvistika revolucio, kiun, en la tridekaj jaroj, sur la poezia kampo lanĉis Kalocsay, Waringhien kaj la Parnasa Gvidlibro."

Cl.- La aŭtoro de la "Litomiŝla Tombejo" bone konscias, pri la komplekseco de tiu ĉi lingva revolucio:

A.- "Kompreneble...

Cl.- li diras

A.- ...en la lingvo ĉio koneksas kun ĉio. Tial ankaŭ la procesoj cititaj ... estas neniam izolaj kaj sendependaj fenomenoj. Sekve necesa sinonimigo... povas esti samtempe termina pliprecizigo ... kaj plua aglutinigo...povas identi kun ekspluatado de la propraj fontoj."

Cl.- Karolo Piĉ tre originale disvolvas sian argumentadon. La teoriajn-konsiderojn ĉiam sekvas praktikaj proponoj, kaj inter ili tuta listo da neologismoj, kiujn li nomas novismoj. En perradia prezento ni nur povas citi el la teoriaj partoj, sed ni multe kuraĝigas vin atente legi la tutan eseon kaj poste la romanon "La Litomiŝla Tombejo", kie la proponitaj novismoj estas eksperimente uzataj. La forto de Karolo Piĉ tute troviĝas en lia agrable flua stilo kaj lia malforto en romanaj mankoj mem: en lia verko okazas preskaŭ nenio, kaj ju pli oni antaŭeniras en la legado de la verko, des pli oni sentas, ke ekster la lingvaj demandoj la aŭtoro ne havis multon por diri. Eble eĉ tiu ĉi manko, kiu estas fundamenta por romano, estas la konsekvenco de la preskaŭ pure lingvaj kaj eĉ lingvistikaj aŭ interlingvistikaj interesoj de la aŭtoro. Tial koncerne tiun ĉi verkon, ne estas eraro antaŭ ĉio ĉefe interesiĝi je la lingvaj problemoj kaj al la solvoj, kiujn ĝuste provas proponi la romano mem.

A.- Por Karolo Piĉ, ni citas, "La romana lingvaĵo estas multilate paradoksa. Unuflanke ĝi bezonas laŭeble tre precizajn terminojn por ĉiuj objektoj de la ĉirkaŭa mondo, tre ofte rekte fakterminojn. Samtempe tamen ĝi ne povas ekzisti sen vortoj, kies senco estas nebula, vaga, pli malpli senkontura, duvizaĝa kaj multsignifa... La foresto de tiaj vortoj prezentas gravan mankon kaj sendiskutan breĉon en la beletra lingvaĵo esperanta. Ĝi estas baro, kiu daŭre bremsas la normalan disvolviĝon de la originala prozo kaj la necesan viviĝon de la konversacia parolo. Ĉar la konversacia parolo ne estas nur demando de stilo. Antaŭ ĉio ĝi estas eĉ afero de multaj ordinaraj, preskaŭ slangaj esprimoj. Ĉar konversacio, tio estas buntaj etiketoj kaj elastaj, sukaj vortoj, trafikaj kiel frapo."

Cl.- Jen asertoj priparolindaj, ĉu ne ?

A.- Eĉ se Karolo Piĉ enbrakas ankaŭ planlingvojn parencajn al esperanto en sia vortkrea esploro, oni ne povas riproĉi al li naturalisman devojiĝon. Kontraŭe, lia reago atentigas nin pri la okcidentalismoj, kiuj endanĝerigas esperanton. Jen tiurilate kelkaj citaĵoj signifoplenaj:

Cl.- "La lingvo ne povas defendiĝi kontraŭ la senĉesa enflado de novismoj. Tamen la elvenanta materialo estu, minimume, zorge kribrita protoradikaro, kaj ne la mizera miŝmaŝo, kiu ĉiutage alfluas. Insurekti, insurekcio kaj insurgento ne estas Esperanto, sed la plej fuŝa okcidenteŭropa piĝino, en kiu eĉ pluraj okcidentanoj mem ne kapablas plu troviĝi... Naturalismo ne estas vojo..."

A.- "Pro tio ke Esperanto ne toleras lingvan naturalismon, tiom pli ĝi bezonegas naturalismon literaturan, Zoleskan, la naturalismon de stilo kaj esprimado..."

Cl.- "Esperanto senĉese pliaĝlutiniĝas. Tiu aglutiniĝado estas senkondiĉa kondiĉo de ĝia plua ekzistado, sed samtempe ankaŭ garantio, ke ĝi ne iĝos speco de "okcidenta dialekto", tio estas ia esperanta varianto de Occidental. Unuavice tamen la aglutineco de Esperanto estas la ĉefa kaŭzo de ĝia riĉeco..."

A.- "La vojo al la perfekta Esperanto estas konata. Ĝi kondukas tra ĝisfunda malnaturaligo kaj raciigo de la sistemo. "

Cl.- Karolo Piĉ per siaj vortproponoj kaj per sia argumentado devigas la esperantistojn repensi sian lingvon kaj ties literaturan disvolviĝon. Tute troviĝas li ŝokos multajn, kaj ĉefe tiujn,

kiuj ne kapablas percepti la lingvajn fenomenojn laŭ iliaj evolutendencoj. Kontraŭe la aŭtoro de la eseo pri "La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj" bone priskribas la fenomenojn de la vivo. Konklude, aŭ klude, kiel li skribas, ni lastfoje citu lin:

A.- "Klude oni povas diri, ke la disvolviĝo, la faka kaj profana riĉiĝo kaj elkonstruo de la lingvo alportos, retre, novajn eblojn ne nur al la prozo, sed ankaŭ al la poezio, ĉar ĝi fekundigos entute ĉiujn kampojn, sur kiuj la idiomo aplikiĝos."

C1.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la lingva kaj verkista aŭtoro de "La Litomiŝla Tombejo". Ĝis reaŭdo !

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*